-ĜENERALA-INFORMILO-

N-ro 59 Aprilo 1988

BARCELONA ESPERANTO - CENTRO

C/CARRERAS I CANDI , 34
TELEFON:2.40.26.62.
08028-Barcelona
Katalunio,Hispanujo

JUNULARA SEKCIO.BE-C

## 12a HEJS-TENDARO

MONISTROL DE MONTSERRAT DE 31a de MARTO ĝis la 3a DE APRILO

ATOMO,KUNLABORIS TRE AKTIVE KUN HEJS KAJ ĴEKA ,en la organizado de la 12a HEJS-Tendaro.Ĉeestis pli da 30 gejunuloj el la diversaj aŭtonomaj komunumoj el Hispanio kaj du junuloj,unu el Partugalio kaj alia el Germanio.Meritas mencii la samideanojn de Alava Esperanto-Asocio,la grupo plej multenombra,kiuj posedis tre bonajn E-lingvajn nivelojn.La prezidanto kaj sekretario de Alava Esperanto-Asocio, konfirmis la aliĝon de AEA al Hispana Esperanto-Federacio.

## N O V A Ĵ O J

Ĵus oni informis ke JEKA Junulara Esperantista Kataluna Asocio organizos elementan E-kurson en sia sidejo dum la monatoj Majo kaj Junio kaj ke la redakcion de la monata revuo K I O ?.... gvidos Jordi Ferré,vicprezidanto de JEKA, poŝtkesto 23484, 08080-Barcelono

----------

En la monato Majo,la sabaton 14an,okazos en Sant Pau d'Ordal la 20an datrevenon de Hispana Esperanto-Muzeo.Tiu ĉi Muzeo estas la institucio plej grava el Hispanio kaj unu el la plej gravaj el Eŭropo.Informojn : S-ro Luis Hernandez Yzal Direktoro kaj Administranto de H.E-M,tel. 899300. aŭ rekte al tel.Maria Teresa,5556492.

----------

Je la fino de Junio disvolviĝos Esperanto-Ekzamenoj de elementa kaj meza niveloj en nia sidejo.Pliajn inofrmojn bonvolu peti en Carreras Candi 34-36,08028-Barcelono aŭ al Telefono 240 26 62.

----------

La monato Julio vere estos tre intensa pri la Esperanto-Movado,ĉar okazos diversaj E-Kongresoj, ni mencias la jenajn:
48a Hispana Kongreso de Esperanto en Valencio,14an ĝis 18an ,
44a Internacia Junulara Kongreso en Zagreb .15an ĝis 22an.
73a Universala Kongreso de Esperanto en Rotterdam,23an ĝis la 30an.

----------

DIVERSFOJE APERIS EN LA ESPERANTO-GAZETARO KONFUZAJ OPINIOJ PRI LA STRUKTURO DE LA ESPERANTO-ORGANIZOJ. Jozefo membro de nia centro demandis: KION MI DEVAS FARI POR ESTI MEMBRO DE H.E.J.S. kaj MEMBRO DE T.E.J.O.?

ATENTU KARULO !! Vi kiel individua membro de Barcelona Esperanto-Centro,jam estas aliĝita membro de H.E.J.S. kaj aliĝita membro de T.E.J.O.;ĉar Barcelona Esperanto-Centro estas aliĝinta Asocio al Hispana Esperanto-Federacio kaj Hispana Esperanto-Federacio estas aliĝinta al Universala Esperanto-Asocio(TEJO-junulara sekcio) kiel landa sekcio de UEA,ekde 1950. Tamen,tamen,se vi deziras esti individua membro de HEJS vi devas pagi 1000 pesetojn,kaj se vi deziras esti individua membro de TEJO (Kategorio MG),vi devos aldoni pliajn 480 pesetojn.

----------